

## EVOLUO DE LA INTERNACIA JURO PRI LA MARO

PRELEGO EN INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO, sesio BEOGRAD, 1973.

( R.L.HARRY, BONN, F. R. GERMANIO )

### 1. LA VENONTA KONFERENCO PRI LA MARA JURO

La internacia juro pri la maro, kiu havas la plej gravan signifon por la popoloj de la mondo, estas en fazo de rapida evoluo. Antaŭ du jaroj la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kunvokis ampleksan internacian konferencon rilate la maran juron. Tiu konferenco estos inaŭgurita en Novjorko en novembro 1973. kaj komencos sian laboron en Santiago de Ĉilio en la sekvonta **aprilo**. Ĝia tasko estos prepari novan konvencion por decidi regulojn pri multaj **aspektoj** de la maroj kaj oceanoj, kiuj kovras du trionojn de la surfaco de la **terglobo**... pri navigado, pri fiŝkaptado, pri la nafto kiun ni bezonas por **energio**, pri mineraloj kaj pri la protekto de la mara medio.

La skizoj ilustras ses problemojn solvendajn de la Konferenco - la larĝeco de la teritoria maro, markoloj uzataj por internacia navigado, oceanaj arkipelagoj, la limo de nacia jurisdikcio sur la kontinenta breto, ekonomia zono ekster la teritoria maro, aliro al la alta maro por landoj sen marbordo. La konferenco ankaŭ devos organizi internacian instituton por administri la fundon de la maro ekster naciaj jurisdikcioj.

---

\*/ Ambasadoro de Aŭstralio en F.R.Germanio (Bonn)

La plej lastaj Konferencoj de la Unuiĝintaj Nacioj pri la marjuro okazis en Ĝenevo en la 1958. kaj en la 1960., kiam oni penis atingi interkonsenton pri la ĉefaj demandoj kiuj restis nedeciditaj en la 1958. - la larĝeco de la teritoria maro, kune kun la rilata demando de la jurisdikcio de la marbordaj ŝtatoj pri fiŝ-kaptado. La bazo por diskutado en la konferencoj de Ĝenevo de la 1958. kaj la 1960. estis aro de 75 projektitaj artikoloj preparitaj dum periodo de ĉirkaŭ 8 jaroj pere de la Internacia Jura Komisiono, organo de spertuloj kiuj kunsidas kiel personoj, sed kiuj larĝe reprezentas la geografiajn regionojn kaj la diversajn jurajn sistemojn de la mondo.

La preparan laboron de la konferenco de Santiago oni komisiis al granda speciala komitato de la Ĝenerala Asembleo de U.N. - komitato de 93 ŝtatoj kiuj raportas al la Ĝenerala Asembleo. Laŭ teknika vidpunkto ĉi tiu prepara komitato por la 1973-à konferenco estas pligrandigo, kun pli ampleksa mandato, de komitato kun 41 membroj nomita la "Komitato pri la Pacaj Uzoj de la Mara fundo kaj la Oceano-fundo ekster la Limoj de Naciaj Jurisdikcioj."

## 2. FAKTOROJ DE EVOLUIGO DE LA JURO PRI LA MARO

Dum preskaŭ jarcento kaj duono, la internacia juro pri la maro estis tre stabila (Vidu "La Maro en Internacia Juro", artikolo de Prof. Doktoro I. Lapenna, Scienca Revuo, Vol. 9-a paĝoj 14 ĝis 25). Precipe post la Milito de la 1939.-1945., ĝi nun fariĝis unu el la gravaj kreskado-punktoj en la Juro de Nacioj. La faktoroj kiuj necesigis kaj kaŭzis ŝanĝon en la substancia juro estis esence teknologiaj: rapida teknologia evoluo en komunikiloj, en metodoj de militado, en metodoj de fiŝ-kaptado kaj en la teknikoj de minado en la profunda maro. La teknologiaj revolucioj de la 20-a jarcento subigis al la influo de la novaj kapablecoj de la homo grandajn areojn de la alta maro kaj de la mara fundo sub ĝi, kiuj dum jarcentoj estis konsiderataj res nullius (nenies proprieto) aŭ kiel iuj preferis diri res communis omnium (ĉies komuna proprieto). La timiga plimultiĝo de la enloĝantaro de la mondo ankaŭ abrupte substrekis la gravecon de la riĉaĵoj, biologiaj kaj ankaŭ mineralaj, de la maro kaj de la mara fundo. La drilado de naftoputoj en la mara fundo plioftiĝis. Ankaŭ oni trovis sur la profunda "planko" de la oceano tuberformajn pecojn de mineraloj, ĉefe el mangano, kupro kaj nikelo. Estas milionoj, eĉ bilionoj da tunoj de tiuj

"manganaj tuberetoj" en diversaj regionoj de la oceanoj. Samtempe, la grandaj malkoloniigoj kiuj sekvis la militojn de la 1914.-1918. kaj ankaŭ tiun de la 1939.-1945., kuniĝis kun la kresko tutmonde de nacia sento por rapide multobligh la nombron de novaj ŝtatoj. Tiuj novaj ŝtatoj estis laŭjure suverenaj kaj egalaj kaj plejparte ili gajnis la rajton paroli kaj voĉdoni en la Unuiĝintaj Nacioj kaj tiel partopreni en la evoluo de la internacia juro.<sup>1/</sup>

### 3. LA KARAKTERO DE LA INTERNACIA JURO - KIEL ĜI ŜANĜIĜAS

La internacia juro, kiel neevitebla en la mondo de la suverenaj sendependaj ŝtatoj estas baze interkonsenta sistemo. La konsento de ŝtatoj estas esprimita plejparte per kutimo (tio estas "ĝenerala praktiko akceptita kiel juro" - Statuto de la Internacia Kortumo, Artikolo 38.1(b)) aŭ per traktato, duflanka (dupartia) aŭ multflanka (multpartia). Ĝis la mezo de la 20-a jarcento, la juro pri la maro estis plejparte kutima laŭ enhavo.

Ŝanĝoj en sistemo de kutima juro estas ordinare malrapidaj. Ili komencas plejofte per unuflanka iniciato fare de interesata ŝtato aŭ grupo de ŝtatoj. Tamen kelkfoje la procezo altiri ĝeneralan konsenton al la proponita nova normo povas esti mallonga kaj rapida. Precize tio okazis pri la fama proklamo en la 1945. de Prezidanto Truman de Usono, kiu asertis, ke la mineralaj riĉaĵoj (precipe la nafto), de la submara plataĵo apud la kontinento, la tiel nomita "kontinenta breto", apartenas al Usono. La nova doktrino plenumis la bezonojn de multaj apud-maraj aŭ marbordaj ŝtatoj kaj rapide trovis ĝeneralan akcepton. Sed pli ofte unuflanka ago provokas protestojn de ŝtatoj kies interesoj estas tuŝitaj, kaj kreas juran konfuzon, en kiu la iniciato estas akuzata de rompo de la nuna juro pli ol aljuĝata la kreinto de nova juro.<sup>2/</sup>

---

1/. Estis 51 "Ĉartomembroj" de la Unuiĝintaj Nacioj en la 1945. 88 ŝtatoj ĉeestis la Ĝenevan Konferencon de la 1958. Estas 133 membroj de la Unuiĝintaj Nacioj en la 1973.

2/. Henkin, "Arkta agado kontraŭ poluado: Ĉu Kanado faras - aŭ rompas - internacian juron?"; 65 American Journal of International Law (Amerika Revuo de Internacia Juro), 131 (Januaro 1971.).

En tiaj cirkonstancoj, la alternativo al evoluo per drasta unuflanka ago estas klopodado por atingi ĝeneralan konsenton rilate multflankan traktaton. Tia traktato povas enhavi la eksplodajn faktorojn de ŝanĝo, kaj povas aljustigi la ekzistantan sistemon al novaj eliĝantaj kondiĉoj, sen la forlaso de ĝiaj esencaj valoroj. Tiucele, la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ŝajnas oferti konstantajn rimedojn. La Artikolo 13 de la Ĉarto postulas, ke la Ĝenerala Asembleo iniciatu studojn kaj faru rekomendojn kun la celo, inter alia (inter aliaj aferoj), "stimuli la iompostioman evoluigon de internacia juro kaj ĝian kodigon". Ĉi tiun devon la Ĝenerala Asembleo regule plenumis, kiel atestas grava serio de konvencioj, elirintaj ofte de la Komisiono pri la Internacia Juro, sed ankaŭ de multaj aliaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj. En ĉi tiu serio, la kvar konvencioj subskribitaj en Ĝenevo en la 1958. pri la juro de la maro estas elstaraj: la Konvencio pri la Teritoria Maro, la Konvencio pri la Alta Maro, la Konvencio pri Fiŝ-kaptado kaj la Konservado de la Vivantaj Riĉaĵoj de la Alta Maro, kaj la Konvencio pri la Kontinenta Breto.

#### 4. LA REGLAMENTO DE ĜENEVO, 1958.

Kvankam la konvencioj de la 1958. estas akceptitaj per sufiĉe grandaj plimultoj, la ŝtatoj tute ne ĝenerale ratifis ilin. La kvar konvencioj ĉiuj ricevis sufiĉe da ratifoj por ekvalidiĝi. Sed ĝis nun la Konvencio pri la Teritoria Maro kaj la Apuda Zono havis nur 40 partiojn. La Konvencio pri la Vivantaj Riĉaĵoj de la Alta Maro havas nur 32. La Konvencioj pri la Alta Maro kaj pri la Kontinenta Breto havas 48. La aldonita protokolo pri la Deviga Decido de Disputoj havas ankoraŭ nur 10, kiuj inkluzivas nenium gravan ŝtaton.

Tamen la nuntempa akceptita juro pri la maro estas pli ampleksa ol tiuj nombroj implicus. Multo en la Konvencio pri la Teritoria Maro, la plej granda parto de tiu pri la Alta Maro, kaj konsiderinda kvanto eĉ de tiu pri la Kontinenta Breto nepre devas esti konsiderata ne kiel nura kontrakto inter la partioj sed ankaŭ deklara de kutima juro, kaj tial aplikebla al ĉiuj ŝtatoj, ĉu partioj en la konvencio aŭ ne. Aliflanke la limigitaj specialaj rajtoj rilate fiŝkaptadon en la Alta maro donita al la marborda ŝtato per la "fiŝkaptada" konvencio estis tute nova juro.

## 5. LA TRADICIAJ KONCEPTOJ DE LIBERECO DE LA MARO KAJ LIMIGITA SUVERENECO

La longa historio de la juro pri la maro montras daŭran konflikton inter du konceptoj de la maro, unflanke la koncepto, ke la maro estas sfero de pligrandigita teritoria suvereneco, kaj aliflanke la koncepto, ke la maro estas libera areo uzebla de ĉiuj ŝtatoj. Eĉ je la komenco de la 18-a jarcento la ŝtatoj, en sia praktiko, akceptis la doktrinon, kiun Grotius, la fama nederlanda juristo, formulis en la 17-a jarcento, kaj kiu estis la koro de "libereco de la maroj" - ke la anoj de ĉiuj ŝtatoj rajtas libere navigi kaj fiŝkapti ĉie en la aperta maro kaj oceano, teknike nomita "la alta maro". En la cirkonstancoj de hodiaŭ oni devas inkluzivi en la liberecoj de la maro ankaŭ la liberecon surfundigi kablojn kaj tubliniojn kaj liberecon de superflugo. Nur en mallarĝa zono ĉirkaŭ la marbordo (la "teritoria maro") la marborda Ŝtato estis rekonita suverena, esence surbaze de la bezonoj de mem-defendado kaj sekureco. Eĉ tie en la teritoria maro la kutima juro donis al la ŝipoj de ĉiuj ŝtatoj, kvankam ne al iliaj aviadiloj, la rajton de "sendanĝera paso". Estas utila difino de sendanĝera paso en la antaŭmenciita Artikolo de Lapenna (p. 21).

## 6. ŜANĜOJ FARITAJ EN LA 1958.

Estis sur tiu ŝajne stabila jura sistemo, ke la dinamikaj fortoj de teknologia kaj politika ŝanĝoj funkciis, kaj funkciis kun iom da sukceso dum la Konferenco de Ĝenevo en la 1958. La klara tendenco de la tiel nomebla "reglamento de Ĝenevo" estis pligrandigi la suverenan aŭtoritaton de la marbordaj ŝtatoj rilate la maron kaj ankaŭ rilate la marfundon apud la bordoj. Ne penante sur ĉi tiu parte kompletan liston oni devas menci:

- (1) tiujn regulojn de la Konvencio pri la Teritoria Maro, kiuj permesas signifan pilargigon de la "internaj maroj" de ŝtato (Skizo 1 ilustras la Koncepton)
  - (a) la uzo sur profunde entranĉitaj aŭ insulfranĝitaj marbordoj de rektaj bazlinioj por mezuri la larĝecon de la teritoria maro, kaj
  - (b) la akcepton de la rajto de ŝtatoj desegni fermantan linion trans la enirejoj de golfoj ne pli larĝaj ol 24 maraj mejloj. (Oni povas vidi la sistemon de rektaj bazlinioj en la Skizo 1-a)

- (2) la rekonon de la "suverenaj rajtoj" de ŝtato rilate la naturajn riĉaĵojn de la apuda Kontinenta Breto, preter la teritoria maro kaj ĝis la profundecolinio de 200 metroj kaj pliproksimen al la limo de ekspluatebleco (Rigardu la skizon 4-an, kiu montras sekcion, ne-laŭskalan, de tipa kontinenta breto).
- (3) la rajton de marborda ŝtato en difinitaj cirkonstancoj sin turni al deviga arbitra proceduro por la konservado de fiŝ-provizoj en areoj de la alta maro proksimaj al siaj marbordoj.

## 7. AFEROJ NE REGULITAJ EN ĜENEVO

### (1) La Larĝeco de la Teritoria Maro

La "Reglamento de Ĝenevo" havis signifon same pro tio, kion ĝi ne inkluzivis, kiel pro tio, kion ĝi ja inkluzivis. La ĉefaj rezistantoj al la novaj pretendoj de la marbordaj ŝtatoj estis la tiel nomitaj "Okcidentaj Marpotencoj": Usono, Britujo, Francujo, Nederlando kaj Japanujo. Tiu grupo havas gravajn interesojn en "la malproksimaj maroj" - la interesojn de komercnavigado, defendado per militŝipoj, kaj fiŝkaptado. Tiaj interesoj estis plejbone servataj per la maksimuma libereco de aliro al la alta maro kaj ties fundo, kaj al la marbordoj de aliaj ŝtatoj. Tiuj faktoroj, ekzemple, motivis ilin energie kontraŭi ĉiujn proponojn por teritoria maro kun larĝeco de 12 mejloj. (Por mezurado sur la surfaco de la maro oni kutime uzas la maran mejlon, t.e. 1852 m.). La tradicia tri-mejla teritoria maro tamen havis nenian ŝancon esti akceptita kiel universala normo. Rezulte, neniu propono pri la larĝeco de la teritoria maro akiris la necesan plimulton por esti enmetita en la Konvencion de la 1958. Rekonante, tamen, la forton de la postuloj, flanke de la novaj kaj "evoluantaj" landoj pri pli larĝa zono por ekskluzivaj rajtoj de fiŝ-kaptado, la Okcidentaj Marpotencoj subtenis en la Konferenco de la 1960. kompromison, de kanada deveno. Tiu kompromiso estus rekoninta teritorian maron, larĝan maksimume ses mejlojn, suplementitan de aldonata sesmejla zono en kiu la marborda ŝtato havu ekskluzivajn rajtojn de fiŝ-kaptado. La Kanadanoj ankaŭ proponis, ke ekzistanta fremda fiŝ-kaptado iompostome malgrandiĝus dum dekjara periodo. Tiu kompromiso malsukcesis pro la manko de nur unu voĉo de la necesa plimulto de du trionoj. Tial la "Regla-

mento de Ĝenevo" lasis nedecidita la larĝecon de la teritoria maro kaj la amplekson de la ekskluzivaj rajtoj de fiŝ-kaptado de la marborda ŝtato.

## (II) Paso tra Markoloj

La malsukceso en Ĝenevo difini la larĝecon de la teritoria maro faris obskuran kaj necertan ne nur la rajtojn de marbordaj ŝtatoj reguligi la zonon apud sia marbordo. Ĝi ankaŭ lasis necertan la rajton de ŝtatoj al paso tra granda nombro da markoloj uzataj dum multaj jaroj por internacia navigado. En multaj kazoj restis disputebla la demando ĉu markolo konsistas tute el teritoria maro, aŭ ĉu ĝi inkluzivas ankaŭ areon de la alta maro (Vidu la duan skizon). La Konvencio pri la Teritoria Maro pritraktis la demandon pri markoloj, kiuj konsistis ekskluzive el teritoria maro, sed la vortoj de la Konvencio ŝajnis lasi disputebla la gravegan, decidan demandon, ĉu aŭ ne fremda militŝipo bezonas la konsenton de la marborda ŝtato, por pasi tra la markolon.

## (III) Oceanaj Arkipelagoj

La apliko de la tradiciaj konceptoj de la mara juro al ŝtatoj, kies teritorio konsistas tute el la insuloj de arkipelago estis konsiderita en Ĝenevo en la 1958., sed neniu teksto estis akceptita. (La problemo estas ilustrata en la skizo 3-a). Ekzemploj de tiaj oceanaj arkipelagoj estas Indonezio kaj la Filipininsuloj, kiuj situas nordokcidente de Aŭstralio. Ambaŭ ŝtatoj pretendas, ke ĉiuj inter-insulaj akvoj kiuj situas interne de rektaj linioj, kunigantaj la plej eksterajn pintojn de la plej eksteraj insuloj, estas "internaj maroj". Konforme oni pretendas tiujn liniojn kiel la bazlinioj por ekstera teritoria maro. La pretendoj pri la arkipelagoj estis la objektoj de multaj protestoj fare de aliaj ŝtatoj, inkluzive de Aŭstralio. Ambaŭ arkipelagaj ŝtatoj, kvankam ili firme insistas pri siaj juraj pretendoj, en la praktiko pretas lasi al fremdaj ŝipoj la rajton de nedanĝera paso, kvazaŭ la interinsulaj maroj estus parto de la teritoria maro. Sed evidente, sen konsidero al demandoj pri la paso de militŝipoj, se la arkipelaga teorio estus korekta kaj strikte aplikata, neniu interinsula markolo povus inkluzivi areon de alta maro. Ne ekzistus eĉ "koridoro" (pasejo) en kiu la rajto de navigado estus tute libera de reguligo fare de la arkipelaga ŝtato.

## V) Kontinenta Breto: Ekstera Limo

(Vidu denove la skizon 4-an)

La Konvencio pri la Kontinenta Breto, kiel mi menciis antaŭe, donis al la marborda ŝtato, eksplicitajn novajn rajtojn de suverena kaj ekskluziva karaktero, por la esplorado kaj ekspluatado de la naturaj riĉaĵoj de la apuda submara breto. Sed la terminoj, per kiuj ĝi difinis la limojn de tiu areo de la nacia jurisdikcio, havis "apertan finon", tio estas ĝi ne preskribis precizan limon. La areo certe iris ĝis la linio de profundeco de 200 metroj, sed egale certe ĝi ne haltis tie (4 Art. 1(a)). La rando forirus aŭ pli-grandiĝus kiel la teknologio de ekspluatado evoluus. Kelkaj kleruloj, puŝante la logikon al la ekstremo, asertis, ke tio potencie permesas al la marbordaj ŝtatoj dividi, parceligi, inter si la tutan oceano-fundon de la terglobo. Tiu konkludo estis neniam intencita, kaj neniu ŝtato iam tion asertis. Sed la preciza limo de nacia jurisdikcio sur la kontinenta breto ankoraŭ restas difinenda. Preter kaj ekstere de tiu limo, kie ajn ĝi estas, situas la profunda oceano-fundo, la "planko" de la oceano, kiu ne estis parto de la "Reglamento de Ĝenevo". Ĝiaj riĉaĵoj, same kiel la riĉaĵoj de la alta maro supre, restis post la 1958. libere preneblaj de ĉiuj - se ili povis, kaj ĝis la grado de siaj kapablecoj.

## (V) Poluado de la Maro

La konservado de la mara medio estas alia afero, kiun oni konsideris en Ĝenevo dum la Konferenco en la 1958. Oni pritraktis ĝin en du, iom provaj kaj laŭpecaj, artikoloj de la Konvencio pri la Alta Maro<sup>3/</sup>, sed oni plejparte lasis la normojn rededitaj. Pri la grandeco de la problemo de poluado<sup>4/</sup> de la maro, nacia same kiel internacia, fakte la registaroj tiam

---

3/. Artikolo 24 devigas ŝtatojn "verki Regulojn" por preventi poluon de la maro per petrolo. Artikolo 25 devigas ŝtatojn "uzi rimedojn" por preventi poluon de la maro per la dumpado de radioaktiva rubo.

4/. PIV donas polucio ...2 (T) Malpurigo de viv-esenca elemento, kiu fariĝas malsaniga por la uzantoj: polucio de riveraj akvoj per kemiaĵoj. Mi proponas la radikon "polu- (polui, poluo, poluado)" kun analoga signifo. Komparu navigacio (navig/i); administracio (administr/i).



nur komencis konscii. Nun ni bone scias, ke se la ŝtatoj ne kunlaboras por ĉesigi la poluadon de la oceanoj per nafto, kemiaĵoj kaj radioaktiva rubo, estas grava danĝero, ke la maro fariĝos ne vivodona patrino de civilizacio sed morta simbolo de la stulteco de la homo.

## 8. EVOLUO POST LA KONFERENCJOJ DE ĜENEVO

### (1) Marbordaj Ŝtatoj kaj Fiŝkaptado sur la Alta Maro

En la jardeko kaj duono post la Konferencjoj de Ĝenevo, la premoj por ŝanĝo de la internacia juro, en la intereso de la marbordaj ŝtatoj, daŭris, kaj fakte pli-intensiĝis. Ekzemple, en multaj mondopartoj, stokoj da fiŝoj, kaptablaj apud la marbordo, malpliigis pro la operacioj de grandaj mekanikigitaj trolŝipoj el ŝtatoj kiuj fiŝkaptis en malproksimaj akvoj. Konsekvence multaj marbordaj landoj postulis pli ampleksajn areojn, kie ili havus ekskluzivan jurisdikcion rilate fiŝkaptadon <sup>5/</sup>.

Multaj ŝtatoj simple proklamis por si teritorian maron de 12 aŭ pli da mejloj. Tiel ili aŭtomate pligrandigis la areon de sia ekskluziva jurisdikcio. Kelkaj aliaj ŝtatoj - inter ili estis Usono, Novzelando kaj Aŭstralio (1967.) - forlasis la tradician identecon de ekskluziva jurisdikcio pri fiŝkaptado kun la teritoria maro. Ni gardis niajn teritoriajn marojn je nur 3 mejloj sed ni asertis ekskluzivan fiŝkaptadan zonon de 12 mejloj for de la bazlinio. Estis forta subteno en Ĝenevo por tia disiĝo inter la larĝecoj de la teritoria maro kaj de la ekskluziva fiŝkaptada jurisdikcio. Kiel mi menciis, por la kompromisa plano de "ses plus ses" (ses-mejla teritoria maro kun ses-mejla zono de fiŝkaptada jurisdikcio) mankis nur unu voĉo por la akcepto. En la Eŭropa Fiŝkaptada Konvencio, 1964., la maraj ŝtatoj de la Okcidenta Eŭropo (escepte de Norvegujo) alvenis al la sama rezulto - 12-mejla ekskluziva fiŝkaptada zono - per la vojo de multflanka traktado.

---

<sup>5/</sup>. En la 1968. granda soveta trolŝipo kaŭzis alarmon en Aŭstralio, vizitante areojn ekspluatatajn de aŭstralianoj por la kaptado de salikokoj eĉ en la malproksimaj akvoj de la Golfo de Carpentaria (pron. karpenterja).

## (II) Pretendoj de Latinamerikaj Ŝtatoj

Pretendojn al multe pli grandskala fiŝkaptada jurisdikcio faris jam en la 1952. tri ŝtatoj sur la Pacifika marbordo de Sudameriko - Ĉilio, Ekvadoro kaj Peruo. Ilia motivo estis la fakto, ke la plej riĉaj areoj por fiŝkaptado en tiu regiono situas preskaŭ 200 mejlojn for de la marbordo. Tie la malvarma maro-fluo de Humboldt alportas bonegan nutraĵon por la fiŝoj. Estas hodiaŭ aliaj membroj de tiu grupo, kiun oni nomas "La Klubo de 200 Mejloj". Ĝi inkluzivas la plejmulton de la ĉefaj marbordaj ŝtatoj de Latinameriko, kaj kelkaj en Afriko. Laŭ la jura vidpunkto, la pretendoj faritaj varias de unu ŝtato al alia. Oni povus eble rigardi Peruon kiel tipa kazo. Ĝi asertas sian "suverenecon" super mar-zonon de 200 mejloj. Peruo pretendas, interne de tiu zono, 12-mejlan ekskluzivan fiŝkaptadan zonon laŭlonge de la marbordo. En la alia parto de la 200 mejloj fiŝkaptado estas permesata, sed oni devas havi Peruan licencon, kaj devas observi la kodon de Peruo pri konservado. Sed estas notinde, ke en tiu areo oni praktikas suverenecon nur pri fiŝkaptado. Navigado kaj superflugo restas tute liberaj, sen iu ajn peno limigi navigadon al "sendanĝera paso".

Kvankam Peruo akceptas navigadon kaj superflugon en la zono de 200 mejloj, kiel sur la alta maro, la reguloj pri fiŝkaptado estas strikte aplikataj kontraŭ fremdaj ŝipoj. Tiuj Latinamerikaj ŝtatoj ne agnoskas la devigan jurisdikcion de la Internacia Kortumo, kaj rifuzas submeti al arbitracio siajn pretendojn al jurisdikcio super la zono de 200 mejloj. Kvankam Usono energie kontestas tiujn pretendojn, ĝi akceptis, pere de sia propra leĝaro, la respondecon kompensi sian fiŝkaptadan industrion pri punoj aljuĝitaj rezulte de fiŝkaptado kiu rompas Peruajn aŭ similajn leĝojn.

## (III) Kanadaj pretendoj

Kanado ankaŭ pligrandigis unuflanke sian fiŝkaptadan jurisdikcion. En la 1964. la Kanada parlamento akceptis Statuton pri la Teritoria Maro kaj Fiŝkaptadaj Zonoj, kiu starigis 12-mejlan zonon de ekskluziva fiŝkaptado, inkluzive de 3-mejla teritoria maro. Amendoj de la 1970. proklamis 12-mejlan teritorian maron kaj permesis la starigon de novaj ekskluzivaj fiŝkaptadaj zonoj en areoj de la oceano apud Kanado sed ekster la teritoria maro.

En Decembro de la 1970., laŭ tiu statuto, "fiŝkaptadaj fermantaj linioj" estis desegnitaj trans la enirejon al la Golfo de Sankta Laŭrenco kaj la Golfo de Fundy (pron. fandi) en la orienta parto de Kanado, kaj trans la enirejon al la Golfo de Reĝino Charlotte (pron. Ŝarlot) kaj la Enirejon Dixon (pron. diksn) en la okcidento. La desegno de tiuj linioj ne faris la ĉirkaŭitajn areojn parto de la internaj akvoj de Kanado, aŭ eĉ parto de ties teritoria maro.

Kanado tiurilate aldonis, al sia akcepto de la deviga jurisdikcio de la Internacia Kortumo, novan rezervon, kiu ekskludos el la aferoj pri kiuj Kanado agnoskas la kompetentecon de la Kortumo disputojn rezultantajn el la nova leĝaro pri fiŝkaptado, kaj pri poluado. La ŝtatoj tuŝitaj de tiu leĝaro devos intertrakti kun Kanado se ili deziras daŭrigi sian fiŝkaptadon, aŭ akiri intervalon por la iom-post-ioma ĉesigo de ekzistanta fiŝkaptada agado en la novaj zonoj. Usono kaj Kanado interkonsentis permesi la daŭradon, sur bazo de reciprokeco, de fiŝkaptado en siaj respektivaj zonoj. Sed Usono ne agnoskis la jurisdikcion de marbordaj ŝtatoj super fiŝkaptado en zono pli larĝa ol sia propra 12-mejla limo. Tial ĝi sendis fortajn protestojn kontraŭ la "fiŝkaptadaj fermantaj linioj" de Kanado.

La malkovro, antaŭ kelkaj jaroj de vastaj rezervoj de nafto, je la norda marbordo de Alasko, stimulis multekostajn klopodojn por pruvi la eblecon de mallonga vojo por petrolŝipoj, per la vojo de la Nordokcidenta Pasejo, tra la Kanada Arkta Arkipelago al la Atlantiko.

La danĝeroj de poluado per nafto, se petrolŝipo estus frakasita de la glacio, en areoj kiuj kuŝas glaciigitaj dum la plejlonga parto de la jaro, aŭ en multaj lokoj konstante, motivis Kanadon fari en la 1970. Statuton pri Prevento de poluado en Arktaj Akvoj. Tiu Statuto evitas la uzon de rektaj bazlinioj, kunigantaj la eksterajn pintojn de la Kanadaj Insuloj, kaj tial estas tute distingebla de la arkipelagaj pretendoj kiujn mi menciis. Fakte ĝi starigas "zonojn pri poluado" en arktaj akvoj, kiuj etendiĝas ĝis 100 mejloj for de la plej proksima punkto de la Kanada tero. Interne de tiuj zonoj Kanado postulis, ke ĉiuj ŝipoj, Kanadaj kaj fremdaj, kiel kondiĉon de paso, observu la preskribitajn normojn de konstruo, navigado kaj funkciado. Usono protestis kontraŭ tiu Statuto, asertante, ke la internacia juro ne permesas al marborda ŝtato praktiki tian jurisdikcion super fremdaj ŝipoj sur la alta maro. Kanado rifuzis procesi tiun konteston, ĉar laŭ la Kanada pretendo, la malnova jura principo, estas elpensita tro multe en

la interesoj de fremdaj ŝipoj, kaj ne sufiĉe rekonas la rajton de la marbordaj ŝtatoj protekti sin kontraŭ minacoj al la ĉirkaŭaĵo de tiuj ŝtatoj... ekzemple kontraŭ nigraj ondoj de nafto.

## 9. PLANOJ POR NOVA MULTFLANKA AGADO

Tiuj ondoj de unuflanka agado povus esti rigardataj, almenaŭ fare de konservativuloj, kiel minacaj, ne nur al la "Reglamento de Ĝenevo" de la 1958., sed ankaŭ al la baza principo de Grotius, pri la libereco de la maro. La grandaj, bone establitaj maraj ŝtatoj, kies tutmondaj interesoj estis speciale spegultitaj en, kaj efektive originale estigis la sistemon de Grotius, komencis konsideri la bezonon de plua ĝenerala konferenco. Ili esperis atingi komunan interkonsenton, super ĉio pri aferoj, kiujn la Ĝeneva Reglamento lasis nedeciditaj, aŭ pri kiuj tiu Reglamento akceptis tute ne kontentigan situacion.

### a. La Deklaracio de Prezidento Nixon

La Prezidento de Usono konstatis trafe, en Majo, 1970.<sup>6/</sup>:

"La nacioj de la mondo nun alfrontas gravajn decidojn rilate la uzon de la oceanoj pere de la homo dum la venontaj jardekoj. Decidenda estas, ĉu la oceanoj estos uzataj racie kaj juste, kaj por la bono de la homaro, aŭ ĉu ili fariĝos areo de senlima ekspluatado kaj konfliktantaj jurisdikciaj pretendoj en kiuj eĉ ŝtatoj kun la plej fortaj avantaĝoj estos perdantoj ... la nuda fakto estas, ke la juro pri la maro ne sufiĉas por plenumi la bezonojn de la moderna teknologio, kaj la zorgojn de la internacia komunumo. Se ĝi ne estas modernigita multflanke, tiam unuflanka agado kaj internacia konflikto estos neevitblaj ... Usono, kiel granda mara potenco, kaj avangarda lando en oceana teknologio, havas specialan respondecon antaŭenigi tiun klopodadon."

En la deklaro pri politiko, kiu sekvis la rimarkojn supre cititajn, Prezidento Nixon (Niksn) pritraktis ĉefe la riĉaĵojn de la mara fundo ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj. Sed li rivelis ankaŭ, ke Usono aktuale klopodis, kune kun aliaj ŝtatoj, atingi novan traktaton, kiu inter alia fiksus je 12 mejloj la mak-

---

<sup>6/</sup>. Deklaro pri Usona Oceana Politiko, 23-an de Majo, 1970.

simunan larĝecon de la teritoria maro, preskribus liberan transiron tra internaciajn markolojn, sufiĉe rekonus la bezonojn de la evoluantaj ŝtatoj rilate la vivantaj riĉaĵojn de la alta maro, kaj protektus du trionojn de la surfaco de la tero kontraŭ poluado. Tiu klopodado kontribuis al la decido de la Ĝenerala Asembleo, je sia 25-a Sesio, kunvoki la Konferencon de la 1973.

## b. La Komitato de la Unuigintaj Nacioj pri la Mara-Fundo - - La Propono de Malto

Dum la kunsido de la Ĝenerala Asembleo en la 1970., konverĝis kun la usona klopodado, kiun Prezidento Nixon menciis, dua strebo, interne de la Ĝenerala Asembleo mem, kaj je la iniciato ĉefe de la evoluantaj landoj, starigi per traktato ĝenerale akceptitan reĝimon por la ekspluatado de la riĉaĵoj de la profunda mara fundo ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj... por ekspluati la naf-ton kaj la mineralojn.

La projekton pri la mara fundo inaŭguris en la Unuigintaj Nacioj la ambasadoro de Malto jam en la 1967. La ekira punkto de Ambasadoro Pardo estis la konvinko, ke la teknologio jam preskaŭ ebligis la ekspluatadon de neimageble grandaj riĉaĵoj sur kaj sub la profunda mara fundo.

Sed oni kredis ankaŭ, ke la teknologio ebligas la militan uzadon de la marprofundoj. Nur internacia regulado povus eviti ekonomian vet-kuradon por mineralaj riĉaĵoj inter la grandaj kaj teknologie evoluintaj landoj kaj, aliflanke, terura konkuro por armado inter ili sur la profunda maro-fundo.

Sur tiu kampo, la kutimaj roloj kiujn ludis la landoj en diskutado rilate la teritorian maron kaj la rajtojn de la marbordaj ŝtatoj pri fiŝ-kaptado estis nete renversitaj. Rilate la maran fundon estis la evoluantaj ŝtatoj kiuj timis unuflankan agadon, fare de la malmultaj grandaj ŝtatoj kiuj estas laŭ teknologia vidpunkto sufiĉe progresintaj por minado-operacioj sur la profunda maro-fundo. Malto urĝis, ke oni kaptu la okazon por deklari, ke la riĉaĵoj de la mara fundo ekster la kontinenta breto estas "la komuna heredo de la homaro", kaj argumentis ke ili devas esti ekspluatataj en la intereso de ĉiuj ŝtatoj, sed aparte konsiderante la intereson de la evoluantaj ŝtatoj, inkluzive de la grava malplimulto de la ŝtatoj sen marbordoj, ekzemple Afganistano kaj Laoso en Azio, Bolivio kaj Paragvajo en Sud-Ameriko, Zambio kaj Ugando en Afriko.

La plano de Malto rapide akceptiĝis. La aspektoj rilatantaj al senarmiĝo iris por studado ĉefe, sed ne ekskluzive, al la Komitato de la Konferenco pri senarmiĝo, en Ĝenevo. Oni preparis tie konvencion, kiu malpermesis la lokigon sur la marofundon ekster 12-mejla marborda zono, de nukleaj armiloj aŭ de iu ajn alia armilo por amas-detruo. La konvencio fariĝis subskribebla ekde Februaro 1971., kaj ricevis ampleksan subtenon, kvankam kompreneble ĝi estas nur komenco, kaj fakte ĝi mem specife antaŭvidas pluan intertraktadon. Rilate la aspekton de riĉaĵoj, oni kreis komitaton kun reprezentantoj de la tuta spektro aŭ gamo de la ŝtatoj. Tiu "Marofunda Komitato prezidata de Ambasadoro Amerasinghe de Cejlono (nun Srilanko) kunsidas ofte ekde la 1967. Tiu komitato, pli-grandigita tiel kiel oni supre menciis, nun fariĝis la Prepara Komitato por la Konferenco de Santiago, samtempe gardante sian specifan mandaton pri la mara fundo. En la Prepara Komitato la du fluoj de planado por multflanka interkonsento pri evoluoj en la juro pri la maro kuniĝis.

#### c. La "Deklaracio de Principoj"

Surbaze de streĉa diskutado de la jura kaj politika same kiel de la teknika kaj ekonomia flankoj, la komitato, pri la Mara Fundo, formulis en la 1970., kaj unuanime akceptis, "gvidliniojn", por la starigo per traktato, de internacia reĝimo, kune kun taŭga internacia administra mekanismo, por reguligi la esplorado kaj ekspluatadon de la riĉaĵoj de la mara fundo ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj. La Ĝenerala Asembleo aprobis la dokumenton de la komitato kiel Deklaracio de Principoj <sup>7/</sup>. La Deklaracio rekonas, ke la estanta jura reĝimo de la alta maro ne havigas substancajn regulojn por la ekspluatado de marofundaj riĉaĵoj ekster naciaj jurisdikcioj. La Ĝenerala Asembleo ankaŭ priatentis, ke la esplorado kaj uzo de tiu areo devas esti entreprenita tiamaniere, ke sama evoluo de la tutmonda ekonomio estu progresigata, kaj ke malutilaj ekonomiaj rezultoj de la fluktado de prezoj de krudaj materialoj estu minimumaj. La gvidlinioj tiel deklaras, ke la reĝimo prizorgu laŭordan kaj racian administradon de la areo kaj ĝiaj riĉaĵoj kaj devas certigi "la justan porciigon inter la ŝtatoj de la avantaĝoj el tio derivataj, aparte konsiderante la interesojn kaj bezonojn de la evoluantaj landoj ĉu marbordaj ĉu sen-marbordaj".

---

<sup>7/</sup>. Rezolucio 2749 (XXV) de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

## 10. LA LIMO DE NACIA JURISDIKCIO SUPER LA MARA FUNDO

La originala Komitato pri la Mara Fundo ne havis komision determini precize, kio estas la limo de nacia jurisdikcio super la mara fundo kaj ĝiaj riĉaĵoj. Kiel supre menciite, la Konvencio de la 1958. pri la Kontinenta Breto lasis nerfermita la eksteran limon je la mara flanko de la submaraj teroj super kiuj la marborda ŝtato havis suverenajn rajtojn pri la marofundaj riĉaĵoj. Kvankam priskribitaj kiel "apud la marbordo", la areo pritraktata en la konvencio etendas ĝis la limo de ekspluatebleco.

Tiurilate, ŝajnis ke ekonomiaj faktoroj eble prokrastos, almenaŭ dum kelkaj jaroj, veran komercan ekspluatadon je akvoprofundecoj multe pli ol 200 metroj. Sed esplora drilado jam okazas je profundecoj de 3000 metroj, kaj oni drilas komercan naftoputon en la aŭstralia breto sub 400 metroj da akvo.

La koncepto de la kontinenta breto, kiun la juristoj adoptis, estis laŭ origino morfologia, tio estas oni difinis laŭ la formo de la lando. Tion la Internacia Kortumo emfaze substrekis en la procesoj pri la Kontinenta Breto en la Norda Maro <sup>8/</sup>. Ĝi deklaris la kutiman internacian juron, tio estas la juron sen rigardo al el-kontraktaj rajtoj kreitaj inter partioj per la Konvencio de 1958. pri la Kontinenta Breto. La kortumo diris, ke la breto estas "la natura plilongiĝo aŭ kontinuaĵo de la landaj teritorioj de la marborda ŝtato, en kaj sub la altaj maroj, voje de la fundo de la teritoria maro de tiu ŝtato." Laŭ tiu vidpunkto, la suverenaj rajtoj de marborda ŝtato kontinuas suben ĝis la punkto kie, tra etapoj konataj kiel la "Kontinenta deklivo", kaj la "Kontinenta leviĝo", la apuda marofundo malsupreniras al, kaj fondiĝas kun, la profunda oceano-fundo, ĝenerale priskribita kiel la "abisma ebenaĵo". La "breto", la "deklivo" kaj la "leviĝo" estas kune konataj kiel la "Kontinenta marĝeno" aŭ la "laŭjura breto". La Internacia Kortumo ankaŭ klare opiniis, ke la morfologia koncepto estas ne nur la bazo de la Kutima juro, sed ankaŭ esenca parto de la konvencio de la 1958. Certe, se oni akceptas tiun koncepton, la neprecizaj vortoj de la konvencio faras bonan sencon. Laŭ la aŭstralia vidpunkto, ambaŭ fontoj, la kutima juro kaj la Konvencio de la 1958. indikas la eksteran randon de la

---

8/. Federacia Respubliko Germanujo kontraŭ Danlando; F.R.G. kontraŭ Nederlando, Juĝo 20-an de Februaro, 1969.

kontinenta marĝeno kiel la limon de la rajtoj de marborda ŝtato, laŭ la juro kiel ĝi nun staras.

Sed multaj landoj, eĉ kelkaj ŝtatoj, kiuj ratifis la Konvencion de la 1958., sugestas, ke oni devas ŝanĝi la limon de naciaj jurisdikcioj por doni malpli al la naciaj ŝtatoj kaj por tiel pligrandigi la marofundan areon ekster tiu limo, la areon kiu enhavu la riĉaĵojn de la komuna heredo, kiu estis protektenda kontraŭ alproprietigo fare de iu ajn ŝtato 9/.

La decido kie nacia jurisdikcio finiĝas kaj la internacia areo komenciĝas grave influos la karakteron de la internacia administra instituto, kian oni planas. Profitoj verŝajne venos pli frue kaj pli facile per la ekspluatado de la malpli profunda ol la pli profunda oceano-fundo. La plej grandaj rezervoj de facile ekspluatebla nafto estas en areoj malpli profundaj ol 200 metrojn. Sur la abisma ebenaĵo preter la kontinenta marĝeno kuŝas tiuj bilionoj da tunoj de tuberformaj mineralpecoj entenantaj manganon, nikelon, kupron, k.t.p. sed ili estas malfacile ekspluateblaj. Estas nur laŭnature tial, ke la landoj sen marbordoj, kaj eĉ kelkaj evoluantaj marbordaj landoj postulas, ke oni malpliigu la areon de nacia jurisdikcio, kaj pligrandigu pro tanto (proporcie) la areon, kiu estas "la komuna heredo de la homaro". Aliflanke kelkaj evoluantaj landoj, precipe tiuj kiuj mem havas konsiderindajn kontinentajn bretojn, dubas ĉu la fikso de mallarĝa limo de nacia jurisdikcio bone servus iliajn interesojn. 97 pro cento de la homaro loĝas en landoj kun marbordo. Grava demando estas kiom la enspezoj, kiujn la proponata internacia instituto eliros el la ekspluatado de la marfundaj riĉaĵoj, estos formangitaj dank' al la kostoj de ĝia administrado. Alia demando estas kiom el la netaj enspezoj estos asignitaj al la ŝtatoj senmarbordaj.

La Ĝenerala Asembleo de UN petis al la Ĝenerala Sekretario studi ankaŭ alian problemon pri marfundaj riĉaĵoj - la efikon sur la evoluantaj landoj de la minado de mineraloj el la marfundo ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj, precipe ĝian efikon sur la prezoj de mineraloj eksportitaj al la tutmonda merkato.

## 11. PREPARA LABORO POR LA KONFERENCO DE SANTIAGO

La Asembleo, en la rezolucio kiu kunvokis la konferencon de la 1973. pri la Mara Juro komisiis la pligrandigitan komitaton pri la mara fundo fari la jenan preparlaboron:

9/. Ĝenerala Asembleo de UN Res. 2749, efikaj paragrafoj 1-3.



- (I) prove verki por la konferenco artikolojn de traktato kiuj enkorpigis, surbaze de la Deklaracio de Principoj, internacian reĝimon, kaj administran mekanismon por la marfundo kaj ties riĉaĵoj ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj. (La Komitato jam preparis projekton de tiaj artikoloj, sed multaj punktoj restas decidendaj ekzemple: kia estos la konsisto kaj povoj de la ĉefaj organoj de la instituto, ĉu ĝi povos mem mini kaj vendi nafton aŭ ĉu ĝi devos aranĝi kontraktojn kun naciaj kaj internaciaj petrolo-kompanioj aŭ kun kompanioj spertaj pri la minado sub la maro.
- (II) Kompili tutampleksan liston de temoj kaj demandoj, pritraktendaj de la Konferenco, rilate la aliajn jurajn aferojn menciitajn en la rezolucio, nome, preciza difino de la areo de la mara fundo ekster naciaj jurisdikcioj, la reĝimoj de la alta maro, la teritoria maro (inkluzive la demandojn pri ties larĝeco kaj la demandojn pri la internaciaj markoloj) kaj fiŝ-kaptado kaj la konservado de la vivantaj riĉaĵoj de la alta maro (inkluzive de la demando pri la preferaj rajtoj de la marbordaj ŝtatoj), la prezervado de la mara medio (inkluzive, inter alia de la prevento de poluado). (La komitato preparis en julio de la 1972. la liston el Dokumenta A/AC.138/66/Rev.1).

## PROGNOZO

Ne estas facile prognozi, kio estos la rezulto de la Konferenco pri la Maro Juro. La prepara komitato espereble transsendos al la Konferenco projektojn de tekstoj pri ĉiuj temoj. Sed la projektoj plejofte konsistos el alternativoj, ekzemple, ke ŝipoj devas havi la rajton de tute libera transito tra la mar-koloj, aŭ ke ili havu nur la rajton de sendanĝera paso. En Santiago, kie ĉeestos verŝajne 140 ŝtatoj, post diskutado kaj la propono de amendoj, la ŝtatoj voĉdonos en komitatoj. Kutime en tiaj "diplomataj Konferencoj" oni decidas per simpla plimulto sendi tekstojn al redakta komitato. Tie, dum la polurado de la tekstoj, okazos pli da intertraktado. Fine oni voĉdonos en la plena asembleo de la Konferenco - eble en la dua kunsido de la Konferenco en la 1975. - pri la fina teksto de la konvencio. Por tio probable plimulto de du trionoj estos necesa.

Estas dezirinde, ke la rezulto estu justa kaj daŭra ekvilibro inter la interesoj kaj celoj de la tri ĉefaj grupoj - la marbordaj ŝtatoj, la landoj sen marbordo (aŭ kun marbordo kiu ne estigas grandajn teritorian maron kaj ekonomian

zonon), kaj la grandaj potencoj kiuj ĉasas riĉaĵojn en malproksimaj akvoj. La ĝenerala aspekto de la nova internacia juro pri la maro verŝajne estos laŭ la sekvantaj ĉefaj linioj:


- (I) La reguloj pri internaj akvoj, kaj pri la bazlinioj de la teritoria maro ne ŝanĝiĝas.
- (II) La larĝeco de la teritoria maro estos maksimume 12 mejloj. La akvoj interne de arkipelagoj havos specialan staton similan al tiu de teritoria maro. Landoj apud ĉirkaŭitaj maroj devos interkonsenti pri la larĝeco de siaj teritoriaj maroj.
- (III) La reguloj pri nedanĝera paso en la teritoria maro estos pli precizaj rilate la rajtojn kaj devojn de la ŝtatoj.
- (IV) Estos pli precizaj reguloj pri paso tra mar-koloj pli mallarĝaj ol 24 mejloj - ekzemple estos difinitaj trafikostrioj en ambaŭ direktoj, kaj estos reguloj por preventi poluadon kaj pri kompenso en kazo de akcidentoj. Kelkaj reguloj estos internaciaj, sed la ŝtato, kies tera teritorio apudas markolon, havos la rajton protekti siajn teritoriajn akvojn.
- (V) La ekzistanta "apuda zono" de 12 mejloj por dogana kaj publiksana protektado ne estos necesa kiam la teritoria maro mem estas 12 mejlojn larĝa.
- (VI) Ekster la teritoria maro estos "ekonomia zono" de 200 mejloj, en kiu la marborda ŝtato havos suverenajn rajtojn pri la naturaj riĉaĵoj kaj rajtos fari regulojn, konformajn al internaciaj normoj, por preventi poluadon kaj por kontroli sciencan esploradon. La landoj en unu sama kontinento aŭ regiono rajtos fari specialajn aranĝojn por sia regiono.
- (VII) En tiu ekonomia zono la fiŝkaptistoj de la marborda ŝtato havos preferan rajton de fiŝ-kaptado. Tio estas, ili rajtos kapti ĉiujn fiŝojn, laŭ sia kapablo, sed la fiŝkaptistoj de aliaj landoj havos la rajton kapti fiŝojn se la marborda ŝtato ne ekspluatas plene ĝis la plej bona grado, tio estas ĝis la plej granda rikolto kiun oni povas kapti sen risko de daŭra malpliigo de la stoko aŭ specio.
- (VIII) Estos plena libereco de navigado kaj superflugo en la zono de 200 mejloj, kaj libereco de agado por ĉiuj ŝtatoj en aferoj kiuj ne rilatas al la naturaj riĉaĵoj; tute kiel en la alta maro.

- (IX) Sur kaj en la mara fundo en la ekonomia zono, kaj ĝis la fino de la kontinenta breto, la marbordaj ŝtatoj havos la rajton ekspluati la naturajn riĉaĵojn.
- (X) Ekster 200 mejloj de la marbordo aŭ bazlinioj la akvoj daŭre havos la stacion de la alta maro, sed la Internacia Instituto regulos kaj ekspluatos la maran fundon. En la distribuado de la produkto de la internacia mara fundo la Instituto donos preferon al la evoluantaj landoj, kaj super ĉio al tiaj landoj kiuj ne havas marbordon.
- (XI) La landoj sen marbordoj havos transito-rajtojn trans la teritoriojn, inkluzive de la teritoriaj maroj, de la landoj kiuj situas inter ili kaj la oceano. Iliaj najbaroj aŭ samkontinentanoj povos doni al ili specialajn rajtojn en la ekonomiaj zonoj de la kontinento.
- (XII) En la areo de la alta maro, inkluzive de la ekonomia zono la venonta Konvencio aplikos specialajn normojn por preventi la poluadon de la mara medio. La Internacia Instituto faros tiucelajn regulojn por la internacia mara fundo. La marbordaj ŝtatoj havos la devon preventi poluadon el siaj riveroj kaj internaj akvoj. Ili ankaŭ havos la rajton kaj devon kontroli la poluadon de la ekonomia zono kaj sur la kontinenta breto.
- (XIII) La marbordaj ŝtatoj havos la devon stimuli sciencajn esploradojn en cirkonstancoj de maksimuma libereco, sed ili havos ankaŭ la rajton insisti pri partopreno de siaj ŝtatoj en la esplorado, pri kondiĉoj de sekureco, kaj pri la publikigo de la rezultoj.
- (XIV) La riĉaj ŝtatoj havos devon helpi la evoluantajn landojn per transdono de financa helpo kaj teknologia scio pri la ekspluatado de la maro kaj pri la protektado de la mara medio.
- (XV) Estos reguloj por malebligi la uzon de la mara fundo por ne-pacaj celoj.
- (XVI) Estos deviga sistemo por la solvo de disputoj pri la rajtoj kaj devoj de ŝtatoj sub la nova juro.


\* \* \*

Se estas bona volo, kaj se ĉiuj landoj kunlaboras, la Tria Konferenco de la Unuigintaj Nacioj pri la Maro estos valora paŝo antaŭen en la evoluo de la Internacia Juro kaj por la paco de la Mondo.


PROBLEMOJ  
DE  
INTERNACIA JURO PRI LA MARO  
(GHIZOJ NE LAŬSMALAJ)




PROBLEMOJ  
DE  
INTERNACIA JURISPRUDENCO PRI LA MARE  
(SUKZES NE LAŬSKALAJ)



④ LA KONTINENTA BRETO  
(LIMO DE NACIAJ JURISDIKCIO)



⑤ LA EKONOMIA ZONO  
? MARGENO AŬ 200 MEJLOJ



⑥ LANDOJ SEN MARBORDOJ,  
KAJ LANDOJ KUN ŜLOSITAJ  
KONTINENTAJ BRETOJ